


65-a jaro n-ro 190 2024:6

la lampiro




A close-up portrait of a man with a full, dark brown beard and mustache. He has dark hair and is looking directly at the camera with a neutral expression. He is wearing a dark, possibly black, V-neck shirt. The background is dark and out of focus.

**Pavlo
Višebaba**

Al mia filino



O **Programa Mia Amiko** tem na EASP sua base institucional, trabalhando juntos pelo progresso do Esperanto. Ao adquirir um livro na EASP, você estará contribuindo para o **Fundo Educação PMA-EASP**, pois uma parte do valor de cada venda será destinada diretamente a esse fundo. Fiquem ligados!



Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Trafe-maltrafe
- 5 | **Recenzo 1**
Kvazaŭ recenzeto...
- 6 | **Kino kaj aliaj artoj**
Anita Malfatti
- 8 | **Kovriltemo**
Al mia filino
- 10 | **Rakonto**
Marsanoj
- 12 | **Iom da Filozofio**
En pariza kafejo kun Bergson
- 14 | **El mia vidpunkto**
Avantaĝoj de uzado de E-o en varmarkoj: invito al komercistoj
- 16 | **Movado**
Rio verda en la Tago de Esperanto
- 18 | **Por iom mediti**
Kooperativismo
- 20 | **Tutmonde**
La G20 en Rio 2024: Tutmondaj Defioj, Rezolucioj kaj Sociaj Efikoj
- 23 | **Iom da poezio**
Kvar orientaj kontraŭlumoj
- 24 | **Recenzo 2**
Memoraĵoj de kampara knabo
- 25 | **Iom da gramatiko**
Lingvaj Respondoj

la lampiro

65-a jaro n-ro 190 2024:6

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima

Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf

Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues

Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2025

Simple Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Trafe-maltrafe

Rapide pasis unu plia jaro. Kaj ĝi jam iras for, kun siaj venkoj kaj malvenkoj, kun trafoj kaj maltrafoj. Indas repensi kaj lerni pri niaj decidoj kaj agoj. Nia Esperanto-movado en Ŝtato San-Paŭlo ja povus esti pli vigla kaj fruktodona. Valora atingo estis la brila funkciado de Programo Mia Amiko, sub la gvidado de la aktivega samideano Adonis Saliba kaj lia diligenta grupo de monitoroj kaj kunlaborantoj. Estas por Esperanto-Asocio de San Paŭlo vera honoro, ke PMA fariĝis partnero de EASP.

Alia fierindaĵo estas nia revuo mem, La Lampiro, kiu ne ĉesis flagri dum la tuta jaro. Samon ni povas diri pri “Esperanto-Notícias”, kaj pri la aktiv-

ado en nia jutuba kanalo. Kaj bela estis la vigla, ĉiumonata amika konversacio en nia virtuala Legoklubo Gilbert Ledon. Krome, nia ŝtata kongreso en la urbo Paulínia, kaj niaj librolanĉoj dum 2024 estis signifoplene sukcesaj.

Ĉu ni estas kontentaj? Relative, jes, sed mankas nia ĉeesta kunvivado en la sidejo de la Asocio. Mi pensas, ke tio estas nemalhavebla parto de nia movado. Por tio, kompreneble, ni bezonas homojn, kiuj pretas funkciigi interesajn eventojn surloke. Ĉu vi mem, kara leganto, havas ideon pri tio?

Dum ni atendas vian amikan reagon, ni deziras al vi Feliĉan Kristnaskon kaj fruktodonan Novjaron.

SCIIGO al la anoj de EASP

La venontan februaron la anaro de EASP kunvenos por elekti novan estraron. La nomaron oni sendu plej malfrue ĝis la 15-a de januaro 2025 al <contato@easp.org.br>.

Pliaj informoj <https://easp.org.br/asocio/estatuto>

Kvazaŭ recenzeto...

Paulo Sergio Viana

Mi ĵus finis la legadon de la libro “Pli leĝera ol aero”. Kaj mi troviĝas en stato de feliĉo, de plena kontentiĝo. Kiam mi legas bonegan libron, trafas min tia stato, kiu iom similas al eta ekstazo. Literaturo fariĝis por mi maniero rigardi la mondon, la vivon, la homojn, kaj foje brila verko kaŭzas al mi tian skuon.

Sekve de tia animstato, mi ĉiam havas la impulson skribi al la aŭtoro, ne nur por laŭdi (li/ŝi certe ne bezonas mian modestan laŭdon), sed por danki. Estas eksterordinara okazaĵo, kiam homo sukcesas feliĉigi alian kunhomon. Mi ŝatus manpreni kaj kisi la manon de Ĥristina Kozlovska, ke ŝi povis ravi min per siaj tekstoj.

Ŝia literaturo estas originala, viveca, kaj la tuŝoj de absurdo en ŝiaj rakontoj transportas nin en metaforojn, kiuj aplikiĝas perfekte en nia mondo. Ŝia novelo pri la junulo, kiu volas kapti la sekreton de tio, kio okazas trans la morto, estas simple



mirinda! Kaj ŝia fabelo pri la homo, kiu vivis en la tero, same. Ho, certe mi relegos la tuton post iom da tempo.

Mi konsideras min privilegia, ke mi ĝuas literaturo en Esperanto. Mi klopodis trovi iun libron de tiu aŭtorino en la portugala lingvo, sed ĝis nun mi ne trovis. Mi esperas, do, ke alia verko de ŝi aperos en Esperanto!

Ĉi tio kondukas min al la tradukintoj, al kiuj mi same ŝuldas dankegon. Petro Palivoda kaj Oleksandr Hriŝĉenko same meritas mian manpremon pro siaj belaj, flua tradukoj, kiuj sonas tute naturaj kaj esprimoriĉaj.

“Pli leĝera...” estas pura plezuro.

Anita Malfatti

Anna Lobo de Carvalho

Hodiaŭ mi parolos pri unu el la plej gravaj pentristinoj – Anita Catarina Malfatti. Ŝi naskiĝis en São Paulo je la 2-a de decembro 1889, kaj estas la dua filino de la itala inĝeniero Samuele Malfatti kaj la usona kaj german-devena ploligloto Eleonora Elizabeth “Betty” Krug.

Ŝi naskiĝis kun ia handikapeco en la dekstra brako, kaj pro tio ŝi trapasis kirurgion kaj restis tri jarojn en Italio, provante korekti la atrofion. Tie oni ne sukcesis plene reakirigi la movojn de la brako. Reveninte al Brazilo, ŝi ricevis apogon de Miss Browne kiu helpis ŝin disvolvi skribadon kaj desegnadon per la maldekstra mano.

Kiam ŝi estis dek tri jaraĝa, ŝia patro forpasis kaj ŝi decidis trapasi sperton de preskaŭ morto kaj kuŝis ĉe la reloj de la trajno kaj atendis. Sperto, kiun ŝi poste priskribis kiel tre teruran. En tiu epoko, ŝia patrino komencis profesie agadi kiel intruisto pri lingvoj kaj pentrarto, kun kiu ŝi eklernis la

teknikojn pri pentrado. Ŝia emo al arto ankaŭ estis influita de ŝia onklo Jorge Krug.

En 1910 Anita alvenas al Berlino kun siaj amikinoj, la fratinoj Shalders. Tiu estis elstara periodo en historio de la germana “Moderna Artaĵo”. Berlino estis tiam la granda muzika centro de Eŭropo. Tie ŝi konis Fritz Burger, kiu ŝin gvidis dum kelkaj monatoj. Poste ŝi eniris ankaŭ en la Akademion de Belaj Artoj de Berlino, sed post unu jaro ŝi fakte rezignis.

En tiu epoko ŝi multe interesiĝis pri la ekspresionisma pentrado kaj emis lerni ĝian koncepton kaj teknikon. Ŝi multe lernis kun Lovis Corinth, kiu post apopleksio havis similan mal-facilecon kun movoj kiel Anita, kio permesis ke li iĝu pli pacienca kun ŝi.

Kun la politika malstabileco kaj la milito kiu ekmontras vizaĝon, Anita decidis reveni al Brazilo. Kaj en 1914 ŝi faras ŝian unuan ekspozicion en São



Anita Malfatti (1889 - 1964)

Paulo, provante havi monsubtenon por studoj en “Arta Gastejo de Ŝtato de São Paulo”. La subteno venus de la senatano Jose de Freitas Valle, kiu fine ne ŝatis ŝian arton kaj ne apogis. Nestor Rangel Pestana rekonis tamen ŝian talenton, sed pro la milito la monsubteno ne plu okazis.

Anita poste iris al Usono kun la helpo de sia onklo Jorge Krug, kie ŝi multe studis. En 1917 ŝi denove revenas al Brazilo kaj proponis duan ekspozicion je la 13-a de decembro, esperante ke tiel ŝia arto estu rekonata de pli granda publiko. Ŝiaj pentraĵoj provokas tiom da polemiko kiom da admiro. Ŝia pentrado “La stultulino” estis forte kritikita de la konserve-muloj de la kultura elito de São Paulo.



Pentraĵo Lernantino, 1919-1916

Sed estis multe admirita de la modernistoj kiel Oswaldo de Andrade, Menotti del Picchia kaj Emiliano DiCavalcanti, homoj kiuj ekdefendis ŝin. Tiu momento estis grava por alproksimigi tiujn kiuj poste sin nomis “La modernistoj” kaj kiuj partoprenis en la semajno de la Moderna Arto en 1922. Dum la semajno Anita partoprenis per 22 el ŝiaj verkoj.

En 1922 Anita vojaĝas al Parizo por studi dum kvin jaroj kun monsubteno en arta gastejo. Tiu estis la lasta kaj plej longa periodo for de Brazilo. En 1929 Anita revenas al Brazilo kiu havis jam alian artan etoson kun pli da artistoj. Tiam ŝi planas la kvaran individuan ekspozicion kaj poste tio, ekde 1932, ŝi dediĉas al instruado. En 1933, ŝi kreas sian atelieron en Higienopolis, kiu restas aktiva ĝis 1952. Ŝi forpasas je la 6-a de decembro de 1964.

Mi esperas ke vi ĝuis koni iom pli pri tiu ĉi grava artistino de la arta scenejo kaj ke tiu ĉi teksto inspiru vin koni iom pli pri ŝi kaj ŝiaj verkoj! Ĝis la sekva fojo!




Al mia filino

Pavlo Viŝebaba

Nur ne skribu al mi pri la milit',
sed ĉu belas tie ĝarden' ĉe vi,
ĉu cikada vekas vin melodi',
ĉu helikoj rampas sur volvokreska vit'.

Kiel homoj sur malproksima ter'
siajn katojn nomas laŭ la kutim'?
Vere ŝatus pleje mia anim',
ke malgaj' forestu nun en via leter'.

Ĉu ĉerizflorado ĝojigas vin?
Se donita estos al vi buked',
ne rakontu pri fuĝ' for de raket',
skribu nur pri nia bona estinta viv'.



Kaj invitu gastojn al nia land',
venu konatar' al Ukraini',
postmilite ilin dankegos ni:
pacon ĝuis tie nia ĉiu infan'.

2022

Elukrainigis **Petro Palivoda**

Pavlo Viŝebaba (1986) estas konata ukraina verkisto, muzikisto kaj soldato.

Li estas premiito de pluraj literaturaj konkursoj, liaj verkoj estas publikigitaj en multaj kolektoj. Pavlo Viŝebaba estas aŭtoro de la poezia libro "Mia generacio".

La poemon "Al mia Filino" li verkis en majo 2022. Ĝi estas respondo al la letero de la filino, kiu estis evakuita eksterlanden pro la milito, kie ŝi demandis pri kio ŝi rakontu al li en siaj leteroj.

La poemo estas tradukita al 15 lingvoj, kaj nun al Esperanto.

Marsanoj

Pavlo Viŝebaba

Ni kun nia brigado antaŭeniris tra mia Donecka naskoregiono al la frontlinio kiel helpotrupo por niaj batalantoj, kiuj jam tenis la defendon. Kamaradoj el diversaj partoj de Ukrainujo unuafoje vidis ŝutmontojn kaj filmis ilin per siaj telefonoj.

— Karulino, rigardu, ni surmarsigis, ni koloniigos. Marso estas ideala planedo, ĉar tie rusoj forestas, — unu el ili komentis la filmadon por sia edzino ĉe subridado de aliaj. La oranĝruĝaj altajoj vere similis marsajn pejzaĝojn.

La suno jam estis je la nivelo de la ŝutmontoj, kio signifis, ke ni urĝe bezonas serĉi lokon por tranokti. Ĉirkaŭe estas kampoj kaj vojoj kun nudaj arboj sur la flankoj. Neniu aludo de arbaro aŭ plantaro, kie oni povus starigi tendojn nerimarkeblaj por malamikaj senpilotaj aviadiloj.

La oficiroj decidis pasigi la nokton en la plej proksima loĝloko kaj pluiri ĉe tagiĝo.

Ni veturas en la vilaĝon: iuj domoj

havas fenestrojn elblovitajn de eksplodondo, aliaj havas rompigitajn tegmentojn, proksime de la triaj gemaljunuloj plantas legomĝardenojn aŭ aranĝas oranĝeriojn. Ni informiĝas de ili, ke la absoluta plimulto de la loĝintoj jam estas evakuita.

Viziti homojn en provizore forlasitaj domoj — tiu ideo eĉ ne venas al niaj kapoj, ni serĉas ion alian. Parto de homoj loĝiĝas en eta ambulatorio, sed por ni restas nur unu eblo — infanvartejo.

Sur la pordo ni trovas noton ukrainlingvan, skribitan kvazaŭ speciale por ni: „Ĉiuj laborantoj de la infanvartejo estas evakuitaj, sed ni kredas, ke ni revenos. Se vi bezonas tranokti, bonvolu ne rompi la pordon, la ŝlosiloj estas kaŝitaj jen kie. La akvo povas esti ŝaltata jen kie (poste malŝaltu ĝin)”.

Ni malŝlosas la pordon kaj eniras. Tie estasodoro de lakto, seĝetoj, molaj ludiloj, ludkorbetoj kaj litetoj kun blankaj toltukoj. Infanoj estis ĉi tie kvazaŭ ankoraŭ matene.

Ni, kun niaj kamuflaj vestaĵoj kaj kotkovritaj armeaj botoj, kun niaj armiloj kaj nerazitaj vizaĝoj, aspektas ĉi tie kiel aliplanedanoj. Nun ni jam sentas nin kiel marsanoj, kiuj alvenis sur la komfortan Teron.

Mi eniras salonon, kie estas piano, artefaritaj floroj, rozkoloraj rubandoj kaj infanaj desegnaĵoj sur la muroj. Ĥarkivano Romĉjo sidas meze de ĉio ĉi sur seĝeto, manpreninte sian kapon:

— Uloj, ĉu tio ne konsternas vin? Min tio konsternas! Ĉio ĉi ne devas esti. Infanoj devas ludi ĉi tie, sed ne ni promeni kun mitraletoj. Ni nun ĉi tie difektos ĉion.

Ĉiuj havas similajn sentojn kiel Romĉjo, kaj ni, malgraŭ nia deziro vespermanĝi kaj enlitiĝi, eklaboras. Dekomence ĉiuj demetas siajn botojn. Ni trovas polvosuĉilon kaj ĉifonojn por la planklavo kaj purigas tion, kion ni jam sukcesis kotkovri per niaj piedoj. Ni volvas tapiŝojn, kunmetas ludilojn kaj litajn tolaĵojn flanken por nenion malpurigi hazarde.

En la memoro por ĉiam reflektiĝas tiu bildo. Mi faris mian laborparton kaj pianludas por la kamaradoj hazardan sontrakon al ĉi tiu superreala spektaklo. La laboro bolas je muzikakompano – iu kunigas la polvosuĉilon, iu balaas, iu portas pelvon kun ĉifono,

alia levas kurtenojn sur la fenestrobreton, ankoraŭ unu volvas tapiŝojn. La fina akordo – kaj ni metas niajn dormosakojn apud la pentritan kameron de Paĉjo Karlo.

Tiuj ĉi muroj, al kutimiĝintaj al kvieteta infana nazosiblado, baldaŭ ektemas pro vira ronkado de ĉiuj eblaj tonaloj.

Mi memoras, ke antaŭ ol mi ekdormis, mi pensis, ke malantaŭ tiu ĉi pentrita kameno sur la muro povus esti pordo al unu el la variantoj de la multuniverso, en kiu sur ĉi tiu planko ne dormas soldatoj kun mitraletoj sub la kapo, sed infanoj lernas novan dancon, preparante sin por “La Printempa Festo”.

Ni ne havis tempon por lasi respondnoton kaj bedaŭris tion. Sed se ni povus, ni skribus la jenon: "Karaj infanoj, al vi venis marsanoj. Pardonu, ke unu fenestrobreto estas malintence rompita, kaj estis nenio inter niaj marsaj iloj por ripari ĝin. Ĉio alia estis ordigita, kvazaŭ por niaj infanoj. Se vi legas ĉi tion, do la milito sur la Tero finiĝis kaj ni revenis sur Marson. Ni revas alflugi iam por viziti vian koncerton en la salono, do bone preparu vin!"

Elukrainigis Petro Palivoda.

Imaga interparolo kun filozofoj

En pariza kafejo kun Bergson (jaro 1922)

Per salto de pli ol 2.200 jaroj, mi forlasis la antikvan Grekion kaj alvenis en Parizo, por renkontiĝi kun la filozofo Henri Bergson kaj paroli kun li pri la tempo.

— Estimata D-ro Bergson, dankon pro afabla akcepto de mia invito por kafo. Mi esperas, ke vi havas tempon por mallonga intervjuo.

— Se vi vere estas el la estonteco, vi devas havi inteligentajn demandojn por fari, kaj tiuokaze mi ne zorgos pri la mezurita tempo.

— Mi interesigās ĝuste pri la distingo, kiun vi faras inter mezurita, kronologia tempo kaj vivita tempo. En miatempa socio, multaj sentas sin sklavo de la horloĝo.

— Ankaŭ nun okazas tio, vizitanto. Tial mi decidis pensi pri la rilato inter homoj kaj tempo. Estas malĝoje vidi,

ke por multaj estas pli grave mezuri la tempon, ol sperti ĝin.

— Feliĉe vi komprenas, ke mi ne estas filozofo, kaj parolas per simplaj vortoj. Tamen, bonvolu simpligi ankorau pli kaj klarigi, kion signifas “sperti la tempon”?

— Bone, por tio mi uzu metaforon. Imagu, ke vi aŭskultas muzikon. Se vi nur kalkulas la sekundojn de ĉiu noto, vi koncentriĝas pri la mezurita tempo. Sed se vi lasas vin peli de la melodio, sentas la emociojn kaj ĝuas la muzikon entute, vi vivas dum la daŭro.

— Bonege, tion mi povas kompreni, D-ro Bergson. Infano, kiu ankoraŭ ne scias, kio estas sekundoj, minutoj, horoj, tagoj, simple vivas la daŭron, la tempon en ties esenco.

— Ĝuste. Kaj ĉiu persono spertas tempon en unika maniero. Unu horo

povas esti multe aŭ malmulte, depende de la mensa stato kaj de la naturo de la afero farata.

— Jes, tio iĝas klara por mi, kiam mi iras al dentisto. Dudek minutoj sur tiu seĝo ŝajnas eterneco. Sed kial multaj maljunuloj diras, ke en ilia infanaĝo la tempo pasis malpli rapide? Ĉu tio okazas, ĉar ili sentas, ke la morto alproksimiĝas?

— Certe la maljuniĝo iom ŝanĝas la homan percepton pri la tempo. Tamen mi pensas, ke en iu ajn vivepoko, la plej influa faktoro por la percepto de la tempa rapideco estas la maniero, kiel la homoj vivas. Pli gravaj estas la kvalitoj de la spertoj, ne la kvantoj. Tiu relativeco...

— Relativeco... Tiu vorto memorigas min pri Ejnŝtejno. Do permesu al mi interrompi vin por demando, mi diru, malpli filozofia kaj pli scienca. En mia tempo ni scias pri viaj malkonsentoj pri la koncepto de tempo kaj...

— Do permesu ankaŭ al mi interrompi, vizitanto. Mia malkonsento pri lia teorio estas pure intelekta, mi trege respektas D-ron Ejnŝtejnnon.

— Kompreneble, kaj ankaŭ li certe respektas vin multe. Vi ambaŭ argumentas je multege pli alta nivelo, ol kverelantoj en sociaj retoj de mia jar-

cento. Sed mi revenu al la temo. Ejnŝtejno asertis, ke estas rilato inter rapideco de movo en la spaco kaj tempopaso, kaj mi certigas al vi, ke tio estos konfirmata kiam la unuaj astro-naŭtoj revenos al la Tero. Kaj ankoraŭ unu afero: sciencistoj malkovros, ke nia planedo turniĝas je 1,7 milisekundoj pli malrapide ĉiun jarcenton. Kion vi pensas pri tio?

— Mi bezonas tempon por digesti tion. Certe tiuj informoj feliĉigos D-ron Ejnŝtejnnon. Tamen mi daŭre pensas kaj insistas, ke, por helpi la homojn elporti sian angoron pro la neevitebla malpliigo de ilia tempo sur la Tero, filozofio havas pli por diri, ol scienco.

En tiu momento, mi rigardis la horloĝon de mia poŝtelefono kaj sciigis lin, ke mia tempo tie finiĝas.

— La kafo estas bongusta kaj mi tuttage rigardus ĉi tiun movadon de elegantaj preterpasantoj kaj la belan Sejnnon en la fono, sed mi devas foriri. Mi petas nur, ke vi diru kelkajn vortojn, ankoraŭ ene de tiu temo, pri la graveco de homaj memoroj. Kaj, fine, donu almenaŭ unu konsilon por miaj samtempuloj.

La filozofo, rigardante sian belan poŝhorloĝon, trankvile respondis, kun eta rideto:

(Daŭrigota sur la paĝo 26)

Avantaĝoj de uzado de Esperanto en varmarkoj: invito al komercistoj

Ĉu vi iam pripensis kiel lingvo povus fortigi vian varmarkon? Esperanto povas esti rimedo kiu transpasas limojn kaj kreas pontojn inter kulturoj. Por entreprenoj, ĝi ne estas nur lingvo, sed strategia ilo por pli larĝa tutmonda atingeblo, unika merkato, kaj alloga mesaĝo de inkluzivo. Jen kial ĝi povus esti via sekreta ingredienco por sukcesa varmarko:

1. Tutmondaj Horizontoj, Sen Lingvaj Bariloj

Esperanto faciligas komunikadon sen limigoj de naciaj lingvoj. Uzante ĝin en via varmarko, vi povas kapti la atenton de internacia publiko uzante univرسالan mesaĝon. Kvankam ĝi ne estas oficiala lingvo de lando, Esperanto estas komprenata de miloj da homoj tutmonde, kiuj aprezas ĝian neŭtralecon kaj tutmondan etikon.

2. Distinga Pozicio en la Merkato

En mondo de intensiga konkurenco, uzi Esperanton en via varmarko povas fari vian entreprenon unika kaj me-

morinda. Malmultaj entreprenoj ankoraŭ uzas ĝin, do ĝi donas al vi avangardan, pioniran bildon kaj apartan lokon en la merkato. Alia interesa avantaĝo estas la facileco por trovi domajnojn kaj simplajn nomojn ĉe sociaj retoj.

3. Marko de Diverseco kaj Etikaj Valoroj

Konsumantoj hodiaŭ serĉas entreprenojn, kiuj simbolas socian respondecon kaj inkluzivecon. Uzante Esperanton, via varmarko komunikas subtenon al mondaj valoroj kiel lingva egaleco, kunlaboro kaj diverseco. Ĝi fariĝas pli ol produkto, sed simbolo de komunaj homaj valoroj.

4. Aliro al Entuziasma Komunumo

Esperantistoj estas pasiaj kaj subtenemaj. Ili ne nur konsumas produktojn, kiuj uzas ties lingvon, sed ankaŭ reklamas ilin per siaj retoj kaj sociaj forumoj. Tiu subtenema komunumo povas esti via partnero por disvastigi vian varmarkon kaj eniri novajn merkatojn.

5. Avantaĝoj en Internaciaj Eventoj

Por entreprenoj, kiuj partoprenas internaciajn foirojn kaj konferencojn, Esperanto povas esti ne nur utila komunikilo, sed ankaŭ signo de kultura lerto. Montru, ke via varmarko estas vere internacia kaj preta alfronti la diversecon de la mondo.

6. Strategia Reta Merkatado

Esperanto havas viglan ĉeeston en la cifereca mondo, de blogoj ĝis sociaj retoj kaj diskutejoj. Varmarko kun Esperanto kiel parto de sia identeco povas profiti de ĉi tiu dinamika ret-komunumo, allogante klientojn kaj altigante sian videblecon rete.

Invito al la Esperanto-Komunumo: Disvastigu la Ideon

Vi, kiel Esperantisto, povas ludi ŝlosilan rolon por instigi komercistojn ekkonscii pri la avantaĝoj de uzado de Esperanto en varmarkoj. Rakontu pri

ĝiaj potencialoj kaj montru konkretajn ekzemplojn de sukcesaj entreprenoj, kiuj uzas ĝin. Viaj klopodoj povas ne nur plifortigi la ĉeeston de Esperanto en la komerca mondo, sed ankaŭ kontribui al pli justa kaj inkluziva merkato.

Kun Esperanto, via marko povas akiri ne nur komercan sukceson, sed ankaŭ subteni tutmondan kunlaboron kaj lingvan diversecon. Ĉu vi pretas fari la diferencon? Ni kune inspiru entreprenojn profiti el tiu ĉi unika ŝanco!

Fabjo Silva

Entreprenisto ĉe Presi -
Mediato Presita kaj Ciferita -
Poŭzalegro, Minaso - Brazilo



Rio-de-Ĵanejro verda en la tago de Esperanto

La lastan dimanĉon, la 15-a de Decembro 2024, oni festis la Esperanto-Tago en Rio-de-Ĵanejro je elstara maniero. Kiam kariokoj^(*) rigardis la pinton de la monto Korkovado, tiam videblis la fama statuo de Kristo Redemptora lumigita je verda koloro omaĝe al la Internacia Lingvo.

Tiu faro realiĝis danke al la streboj de la esperantisto Walter Fontes, kiu oficialigis la peton ĉe la Sanktejo *Cristo Redentor*, kun apogo de la esperantista komunumo ĝenerale, kiu kunlaboris en la entrepreno.

En la sama vespero, aliaj notindaj monumentoj en la regiono estis ankaŭ lumigitaj, nome la Muzeo de Nuntempa Arto (MAC) en urbo Niterói, la sidejo de la Urbkonsilantaro de Rio-de-Ĵanejro en la centro kaj la tradicia preĝejo de Penha, en la karioka antaŭurbo, kaj tiel la verda koloro de Esperanto elvideblis en pluraj lokoj.

Simpla ceremonio en kunfratiĝa etoso okazis en la malgranda kapelo sub la monumenta statuo, kun paroloj de reprezentantoj de esperanto-movado, poem-deklamado kaj kunkantado. Kiel la statuo de Kristo Redemptora, kun malfermaj brakoj bonvenigis al ĉiuj pastro Cristiano, nome de la sankteja rektoro pastro Omar.

Post kantado de la esperanta himno, la vicprezidanto de Universala Esperanto Asocio, Fernando Maia Junior, kaj la prezidanto de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro, Márcio Santos, alparolis la ĉeestantojn pri la graveco de Esperanto en nuntempa mondo kaj ĝia rilato kun la idealoj de amo, frateco, espero kaj fido, eĉ dum malesperigaj momentoj. Sekve, Walter Fontes parolis kiel elpensinto de la evento Kaj vigle deklamis la poemojn "O Caminho", tradukaĵo de la zamenhofa "La Vojo", kaj "Jozefo", tradukaĵo de la poemo "José" de Carlos Drum-

mond de Andrade, ambaŭ faritaj de Sylla Chaves. Graça Thuler siavice deklamis la klasikaĵon "La Vojo" kaj la poemon "Inkubo", verkitan de Aloísio Sartorato sub inspiro de Drummond de Andrade, kaj Patricia Guerra deklamis la poemon "Amdeklaro" de la karmemora Neide Barros Rego.

Fine, muzika kvaropo konsistanta el la gefratoj Vitor kaj Selma Mendes, Gustavo Garcia kaj Luiggi Company regalis la ĉeestantojn per kanzonoj de la karioka kantaro, kiel "Urba Valsa (Valsa de uma cidade)", "Knabino el Ipanema" (Garota de Ipanema) kaj "Korkovado" (Corcovado). Tiam kaj ekstere, la preskaŭ 70 ĉeestantoj okulatestis la verdan lumigon de lastatuo de Kristo Redemptora.

Kiel fermo, oni eldiris la preĝon "Patro Nia", unua teksto en esperanto publikigita en Brazilo. Kaj festene, la partoprenantoj ankaŭ kunkantis "Gratulon al vi" kaj "Urbo mirinda" (Cidade Maravilhosa) laŭ versio de Jair Salles.

Mencioj pri la verdlumigo de Kristo Redemptora okaze de la Esperantotago aperis en la ĵurnaloj kaj gazetoj *O Dia*, *Folha do Leste*, *TV Prefeito.com*, kaj en la retpaĝoj kaj sociaj retejoj de Sanktejo *Cristo Redentor*, de Spiritisma Konsilio de la Ŝtato Rio-de-Janeiro, en *Radio Rio de Janeiro* kaj

sennonbras esperanto-asocioj en Brazilo kaj Eksterlando.

* **Karioko:** naskiĝinto en aŭ loĝanto de la urbo Rio-de-Janeiro.

Fonto: *AERĴ informas n-ro 148 de 19.12.2024*



Dekstre: Walter Fontes, iniciatinto de la statuo-lumigado. Sube: ceremonio-partoprenantoj ĉe la statuo Kristo Redemptora verde lumigita.



Kooperativismo

“Kooperativismo estas socio-ekonomia sistemo, kiu baziĝas sur kuniĝo de homoj kun komunaj intereso, kiuj kunlaboras unu kun la alia por atingi komunajn celojn. Kooperativoj estas organizitaj demokratie, kun la membroj konsiderataj "komercoposedantoj" kaj farantaj decidojn en assembleoj.”

“Kooperativismo celas ekvilibrigi socian justecon, ekonomian prosperon kaj daŭripovon, respektante kolektivajn interesojn kaj individuajn aspirojn.”

“Iuj karakterizaĵoj de kooperativismo estas:

- Libervola kaj senpaga adhero
- Demokratia Administrado
- Ekonomia Partopreno
- Aŭtonomeco kaj Sendependeco
- Interkooperado
- Interesiĝo pri la komunumo”

“En Brazilo, la unua kooperativo estis fondita en 1889, en Minas Gerais,

kaj la unua kredita kooperativo estis fondita en 1902, en Nova Petrópolis (RS).”

“En Brazilo, kooperativismo ĉeestas en diversaj branĉoj, kiel agrikultura, konsumado, kredito, infrastrukturo, sano, inter aliaj. La ĉefa celo estas starigi, samtempe, ekonomian kaj socian disvolviĝon kaj la individuan kaj kolektivan, ĉiam daŭripovan kaj ekvilibrantan.”

“La principoj de kooperativismo baziĝas sur senpaga aliĝo, demokratio, ekonomia partopreno, aŭtonomeco, edukado kaj scio, interkooperado, kaj ankaŭ interesiĝo pri la komunumo.”

“Kooperativismo anstataŭigas la dungo-salajran rilaton per la labor-enzpeza rilato. En kooperativo, kio plej valoras estas la homoj kaj kiu diktas la regulojn estas la grupo. Ĉiuj konstruas kaj venkas kune.”

Tiu ĉi Kooperativismo kiu sukcesas pli kaj pli en niaj nunaj tempoj, me-

ritas esti rigardata de ni, Esperantistoj, por ke ni lernu ion pri koopero inter ni mem!

Kiam ni laboras kune, celante la komunan celon, ni konstruas aron da personaj agadoj por fari la dezirindan rezulton. Do la personaj celoj foriras, favore al sociaj celoj. Ni vidas ĉiam multe da personaj agadoj, sed malmultfoje ni sentas la socian agadon, kie la komuna intereso estas la celo.

Kiu estas la precipa celo de iu ajn grupo de Esperanto? Ĉu ĝia disvastigado? Ĉu la instruado? Ĉu la disvastigado de alia idealo per Esperanto? Ĉu la verkado en la Internacia Lingvo?

Kiam la soldatoj pafas al malsamaj direktoj, neniam ili atingos la celojn.

Ĉu ni laboradas kune? Niaj kongresoj sumas malmultajn partoprenan-

tojn, pro la kostoj de la vojaĝoj, pro la kostoj de la hotelo, pro aliaj intereso de tiuj kiuj ne partoprenas de la movado.

Vere, multaj kialoj karigas tiajn ĉi situaciojn de nia movado. Sed, se ni ne pensos pri tio, nenio ŝanĝiĝos laŭlonge de nia esperanta movado.

Kiu povos pensi kaj kunlabori kun EASP, prezentante Planon por ŝanĝi la Esperantan Agadon? Aŭ ĉu ne estas necese ŝanĝi ion ajn?


Rimarkigo: La komencaj citaĵoj estis prenita el kelkaj repaĝoj.

João Otávio Veiga Rodrigue

Rotary E-Club de Esperanto - Brasil

PDG 2016/2017 - D4560 - Rotary International


INTERNACIA SIMBOLO DE KOOPERATIVISMO



La G20 en Rio 2024: Tutmondaj Defioj, Rezolucioj kaj Sociaj Efikoj

Ĉi tiu artikolo proponas analizon de la tutmondaj defioj traktitaj ĉe la G20-pintkunveno 2024 kaj kiel la rezolucioj adoptitaj povas rekte influi la internajn politikojn de landoj, inkluzive de Brazilo.

La G20, grupo formita de la 19 plej grandaj ekonomioj de la mondo kaj la Eŭropa Unio, ludas centran rolon en kunordigado de tutmondaj ekonomiaj politikoj, kun grava efiko al sociaj, mediaj kaj politikaj aferoj. En 2024, Brazilo, tra la urbo Rio-de-Ĵanejro, gastigis la pintkunvenon de la G20, eventon kiu markis kritikan momenton en la tutmonda historio, traktante temojn kiel klimata ŝanĝo, ekonomia malegaleco, nutraĵa sekureco kaj geopolitiko. Ĉi tiu artikolo analizas la ĉefajn temojn diskutitajn, la rezoluciojn atingitajn dum la renkontiĝo kaj la eblajn sociajn efikojn



de la evento en Brazilo kaj en la mondo. Per literaturrecenzo kaj analizo de nuntempaj fontoj, ni celas taksu la gravecon de la rezolucioj kaj la defioj, kiujn landoj alfrontas en efektivigo de la decidoj prenitaj en la nuna kunteksto.

La G20, kreita en 1999 kiel respondo al la tutmonda financa krizo, kunigas la ĉefajn ekonomiojn de la mondo, reprezentante proksimume 85% de tutmonda MEP kaj du trionojn de la monda loĝantaro. La pintkunveno de 2024, okazigita en Rio-de-Ĵanejro, ne nur reasertis la rolon de la G20 kiel platformo por internacia dialogo kaj kunlaboro, sed ankaŭ koncentriĝis pri temoj de ekstrema graveco por la estonteco de la planedo. La kreskanta interdependeco de ekonomioj kaj tutmondaj defioj, kiel klimata ŝanĝo kaj socia malegaleco,

postulas kunordigitajn respondojn inter la ĉefaj mondaj potencoj.

Ĉi tiu renkontiĝo traktis kritikajn temojn kiuj rekte influas la tutmondan ekonomion, kun emfazo sur: Klimata Ŝanĝo kaj Media Daŭripovo: Altiĝantaj tutmondaj temperaturoj kaj ĉiam pli intensaj naturaj katastrofoj postulas urĝan agadon. La G20-landoj diskutis pri la bezono de justa energitransiro, kiu antaŭenigas la redukton de forcejefikaj gasoj kaj garantias la konservadon de ekosistemoj esencaj por la homaro; Ekonomia kaj Socia Malegaleco: La kreskanta malegaleco inter riĉuloj kaj malriĉuloj estas unu el la plej grandaj defioj de hodiaŭ. La G20 en 2024 traktis publikajn politikojn, kiuj celas redukti malriĉecon, plibonigi distribuon de enspezo kaj pliigi aliron al esencaj servoj, kiel sano kaj edukado, precipe en evolulandoj; Manĝaĵ-sekureco: La efiko de klimata ŝanĝo sur agrikultura produktado, kune kun geopolitikaj konfliktoj kaj la COVID-19-pandemio, plimalbonigas manĝkrizon en pluraj regionoj. La pintkunveno diskutis strategiojn por pliigi tutmondan manĝaĵsekurecon kaj kreskigi daŭrigeblan manĝaĵproduktadon; Teknologio kaj Novigado: Pliiĝanta cifereciĝo kaj artefarita inteligenteco (AI) generas kaj ŝancojn kaj defiojn por G20-landoj. La pintkunveno diskutis pri reguligo de

teknologio por certigi ke la avantaĝoj de novigado estas distribuataj juste kaj ke etikaj temoj kiel privateco kaj cibersekureco estas adekvate traktitaj; Geopolitiko kaj Internacia Sekureco: Altiĝantaj internaciaj streĉitecoj, precipe rilate al la milito en Ukrainio kaj kreskantaj rivalecoj inter potencoj kiel Usono, Ĉinio kaj Rusio, regis diskutojn pri kiel la G20 povas agi por mildigi konfliktojn kaj antaŭenigi pacon kaj tutmondan stabilecon.

La G20 aprobis serion da rezolucioj, kiuj celas direkti tutmondajn politikojn en la venontaj jaroj. Inter la ĉefaj rezolucioj elstaras jenaj: Tutmonda Klimata Interkonsento, Tutmonda Plano por Kontraŭbatali Malegalecon, Interkonsentoj pri Nutraĵa Sekureco kaj Cifereca kaj Teknologia Reguligo.

La pintkunveno de G20 en Rio-de-Ĵanejro havis rektan efikon al Brazilo, kaj en la politika, ekonomia kaj socia areno. Kiel gastiganta lando, Brazilo prenis gvidan rolon en la diskuto pri klimata ŝanĝo kaj socia malegaleco. La decidoj prenitaj povas plifortigi internajn politikojn, kiel la engaĝiĝo al Amazonio kaj la serĉo de solvoj al malriĉeco, krom antaŭenigi eksterlandan investon en daŭrigeblaj sektoroj.

Sociaj Efikoj: G20-rezolucioj povas generi plibonigojn en la vivkondiĉoj de

vundeblaj loĝantaroj, precipe en lokoj trafitaj de media degenero kaj manĝaĵ-malabundoj. Pligrandigo de aliro al teknologioj kaj cifereca inkludo ankaŭ povas kontribui al reduktado de malegalecoj en Brazilo.

Ekonomiaj Efikoj: Brazilo povas profiti de pliigo de investoj en renovigebla energio, daŭrigebla agrikulturo kaj cifereca infrastrukturo. Efektivigi politikojn kiuj antaŭenigas socian justecon ankaŭ povas generi pli inkluzivan ekonomian kreskon, reduktante malegalecojn inter sociaj klasoj.

La G20 estis unika ŝanco pripensi ŝlosilajn tutmondajn defiojn kaj difini kolektivajn solvojn. La aprobitaj rezolucioj havas la eblecon generi signifajn ŝanĝojn en la batalo kontraŭ klimata ŝanĝo, ekonomia malegaleco kaj nutraĵsekureco. Tamen, la efika efektivigo de tiuj rezolucioj dependos de forta internacia kunlaboro kaj la kapablo de landoj venki siajn naciajn interesojn en la nomo de tutmonda komuna bono.

Bibliografiaj Referencoj

Baldūin, R. E. (2016). *La Granda Konverĝo: Informa Teknologio kaj la Nova Tutmondiĝo*. Harvard University Press.

Cox, R. W. (1987). *Produktado, Potenco kaj Monda Ordo: Sociaj fortoj en la Kreado de Historio*. Columbia University Press.

Stiglitz, J. E. (2002). *Tutmondiĝo kaj Ĝiaj Malkontento*. W. W. Norton & Firmao.

Sachs, J. D. (2005). *La Fino de Malriĉeco: Ekonomiaj Eblecoj por Nia Tempo*. Penguin Press.

Rodrik, D. (2011). *La Tutmondiĝo-Paradokso: Demokratio kaj la Estonteco de la Monda Ekonomio*. W. W. Norton & Firmao.

Unuiĝintaj Nacioj (2021). *La Tagordo 2030 por Daŭripova Evoluo*. Unuiĝintaj Nacioj.

Patricia Guerra Radsack

PhD-studento ĉe Salgado de Oliveira University – Niterói-RJ Campus. Havas magistron de Universidade Salgado de Oliveira – Campus Niterói-RJ.



Estas diplomita pri Historio ĉe la Universitato Salgado de Oliveira en São Gonçalo – RJ. Ŝi havas kvalifikaĵojn en Geografio, Sociologio kaj Filozofio. Disvolvas esploradon en la areo de krimo en la regiono Santa Luzia do Carangola fine de la 19-a jarcento.



Kvar orientaj kontraŭlumoj

Juan Trepiana

1

Ho, nedaŭreco.
Revenas ĉio hejmen,
sed hejmo mankas.

2

Neeldireble,
vi serĉas mian koron.
Kial mi blindas?

3

Mi tro cerbumis,
la malplenon... tro june...
Nune silento.

4

Mi kulpe ŝtelis
vian lumon senliman.
Ho, Amitabo.*

* **Amitabo** estas la Budho de la senlimaj lumoj kaj vivo. Ĉi tiu skolo de Budhismo estas nomata "Pura Tero" (en la sanskrita lingvo: Sukhavati). Simple reciti la nomon de Amitabo permesas la renaskiĝon en tiu Tero de ĝojo kaj feliĉo, evitante renaskiĝojn en la regnoj de la Saṃsāra kaj tranĉante la karmajn ligilojn. Ĉi tiu tradicio estas ankaŭ nomata "La facila vojo" kaj estas la budhisma skolo kun plej multaj membroj, ekzemple en Japanio. Ĝia origino estas en la Mahajano Budhismo, kun influaj figuroj kiel Nagarjuna en la 3-a jarcento, kiuj kontribuis al la evoluo de la skolo, Shantao en Ĉinio, kiuj ankaŭ ludis gravajn rolojn en la disvastiĝo de la Budhismo de la Tero Pura. En Japanio, la skolo estis solidigita per la laboro de Honen Shonin kaj Shinran Shonin.

Memoraĵoj de kampara knabo

Paulo Sergio Viana

“Memoraĵoj de kampara knabo”

Aŭtoro: Xosé Neira Vilas

Traduko: Suso Moinhos

Eldonis Mondial

Ĉi tiu preskaŭ 100-paĝa libreto estas ia gemo! Legante ĝin, oni sentas kortuŝojn, plezuron, amuziĝon, kaj emon pripensi. Unu el tiaj libroj, pri kiuj oni bedaŭras, kiam alvenas al la lastaj paĝoj. Kaj pri kiuj oni promesas al si mem relegadon, post iom da tempo.

Kiel rafinita literaturaĵo, ĝi estas simpla, rekta, senornama, tute sincera. Mesaĝoj kaŝiĝas inter tiuj simplaj frazoj, tiel ke la leganto sentas la bezonon eltrovi kaj montri ilin al si mem. Jen trajto de vera literaturaĵo: la leganto kunverkas.

La libro konsistas el prezento, antaŭparolo, ilustraĵoj, fotoj pri la aŭtoro kaj dek ses ĉapitroj, el kiuj estas mal-



facile elekti la plej ĉarman. Ili ĉiuj enhavas rememoraĵojn de kampara knabo, malriĉa kaj ĉirkaŭata de severaj homoj kaj cirkonstancoj, en tempo de malriĉeco, en la 20-a jarcento, en Galegujo. Malriĉeco eble estas la plej kruela, sed ne la sola.

Perfekte formiĝas la peniga strebado de sentema, inteligenta knabo, kiu devas kompreni la vivon kaj la mondon, trans la kunvivado kun plenkreskuloj, kiuj ofte agas absurde. Li baraktas meze de superstiĉoj, scienco, kruda laboro, punado per paroloj kaj batoj — kaj precipe la premego de sociaj maljustaĵoj. Tiusence, la verko enhavas nepran politikan aspekton.

El ĉiu ĉapitro oni povas elpreni belan instruon, vivlecionon, emociojn. Aparte bela estas la ĉapitro “Eladia”,

(Daŭrigota sur la paĝo 26)

Lingvaj Respondoj

de Francisco Wechsler



Demando

En unu el la tekstoj legitaj en nia Legoklubo Gilbert Ledon, nome *Fabelo pri eliksiro*, verkita de Tatjana Teĥerova, oni trovas la jenan frazon: *Komence li aŭdacis serĉi efikan kuracilon por ordinara malvarmumo. Ĉu la prepozicio por en tiu frazo estas ĝusta?*

Respondo

Jes, la uzo de la prepozicio *por* en tiu frazo estas tute ĝusta. Simple dirite, la prepozicio *por* povas esprimi: 1) celon; 2) interŝanĝon; 3) prezon; 4) predikaton; 5) personon koncernatan de ago; 6) tempodaŭron de ago.

En la ĉi-supra ekzemplo, por evidente esprimas la celon (utilon) de la serĉata kuracilo. do temas pri la uzo 1. Jen kelkaj pliaj ekzemploj, ĉerpitaj el la Zamenhof-a verkaro:

Uzo 1:

*Sed nun la juna fil' de Fortinbras [...] amasigis aron da kuraĝuloj kaj aventuristoj **por** entrepreno, kiun nia regno komprenas bone; (Hamleto)*

Uzo 2:

*Mi multe **dankas vin por** via gastameco. [Mi dankas vin interŝanĝe al via gastameco.] (La Revizoro)*

Uzo 3:

*[...] la tuta vortaro [...] povas esti ricevita **por** kelke da centimoj en kia ajn lingvo [...]. (Fundamenta Krestomatio)*

Uzo 4:

*Ŝajnas al mi tamen, ke ili min prenas **por** regna homo. (La Revizoro) [Ili min traktas kvazaŭ regnan homon.]*

(Daŭrigota sekvapaĝe)

Daŭrigo de la pago 25

Uzo 5:

[...] **por** multaj esperantistoj eble estos interese legi libron aperintan en la unuaj jaroj de Esperanto [...] (*La Batalo de l' Vivo*)

Uzo 6:

*Se la militistaro mortigita sur la kampo de l' batalo povus **por** unu momento sin levi en la formo, kiel ĉiu falis, [...]* (*La Batalo de l' Vivo*)

Tiujn diversajn uzojn detale kaj amplekse diskutas Plena Ilustrita Vortaro.



Daŭrigo de la pago 24

en kiu li priskribas sian enamiĝon al la instruistino. Ankaŭ la ĉapitro pri la avo, kiu instruas al li pri amikeco, meritus sidi en antologio.

Fine de la bela verko, elstaras en la kapo de la leganto la pozitiva, esperdona sugesto, ke nenia baro povas eviti, ke forta spirito venku la malfacilaĵojn de la vivo, eĉ se ili estas teruraj. Sed ankaŭ, ke ĉies devo estas zorgi pri la infanoj kaj favori ilin per pli glata vojo al digna vivo. Sendepende de homaj klasoj.



Daŭrigo de la pago 13

— Ankaŭ mia mezurata tempo finiĝas, miaj lernantoj atendas min. Ha, la memoroj... Mi rekomendas legadon de mia libro "Materio kaj Memoro". Vi certe aludas al tio, kion mi nomis spirita memoro, distinge de la korpa memoro, kiu regas niajn aŭtomatajn agojn. La vivo ŝajnas esti pli longa por tiuj, kiuj havas pli da tiaj spiritaĵoj. Kaj mi kredas, ke ili fiksiĝas en la menso pli efike, kiam oni faras aŭ spertas plendezire unu

Iom da Filozofio

aferon, ol mil senatente. Adiaŭ, kara vizitanto.

— Adiaŭ, sed ne lasu min foriri sen ekzempleroj de viaj elpensaĵoj.

— Ho jes, mi preskaŭ forgesis. Diru al viaj samtempuloj, ke

"Ni ŝanĝiĝas, do ni ekzistas."

"La kvalito estas la kvanto de la morgaŭo."

José Mauro Progiante

Quer aprender Esperanto?



pma.esperanto.org.br